



共同

话语

# Mikrofone

7-a jaro • Aprilo-Junio, 2009





7-a jaro • Aprilo-Junio, 2009



CRI 中国国际广播电台世界语部  
Esperanto-redakcio de CRI

N.26

## Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuajfoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuajfoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!

# ENHAVO

- 3** Tibeto post 50-jara demokratia reformado
- 5** Aktivado memore al unujariĝo de tertremo en Wenchuan
- 6** Ĉinio ludis gravan rolon en la 2-a Financa Pinta Konferenco de ŝtatestroj de Grupo 20
- 7** Bone zorgu vin vizaĝe al la mondskala gripo A H1N1 Averta nivelo de gripo A H1N1 altiĝas al 6-a grado
- 8** Ĉinio publikigis Ŝtatan Agadplanon pri Homaj Rajtoj Forta tertremo okazis en Italio
- 9** Pri la Foto-Konkurso en 2008
- 10** **Intervjuo**  
Esperanto estas mia spirita partnero!
- 12** Cititaj Leteroj
- 14** Tra la Mondo
- 15** **Mikronovelo**  
Ĝibo

La kuranta jaro estas la 60-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En la 60 jaroj la ĉinaj registaro kaj popolo strebis al konstruado de la lando, tiel ke la ĉina ĝenerala landforto altiĝis multe, la vivo de la popolo riĉiĝis paŝo post paŝo, kaj la diversaj kampoj, kiaj industrio, agrikulturo, scienco kaj tekniko, akiris grandajn atingojn. Por ke aŭskultantoj kaj retanoj de diversaj landoj ĝenerale konu la 60-jaran disvolviĝon de nova Ĉinio kaj la atingojn akiritajn en ekonomio kaj socio, Ĉina Radio Internacia lanĉos de la 1-a de junio la aktivadon Mondskala Konkurso de Scioj pri "60-jariĝo de Nova Ĉinio" en senfadena disaŭdigo kaj ĈRI-enreto. Bonvolu partopreni en ĝi.



# Tibeto post 50-jara demokratia reformado



La 28-a de marto ĉi-jare estis Memortago de la Emancipiĝo de Tibetaj Servutuloj okazinta antaŭ 50 jaroj en Tibeto. Tiutage en Lasao okazis la celebra kunveno kaj en Pekino okazis literatur-arta vespero.

Dank' al la demokratia reformado antaŭ 50 jaroj miliono da servutuloj emancipiĝis kaj ilia vivo fariĝas pli kaj pli feliĉa. En la jaro 2008 la totala produkvaloro de Tibeto proksimiĝis al 39,6 miliardoj da juanoj, 65-oble pli ol tiu en la jaro 1959. Nun en la tuta regiono la pokapa posedo de loĝdomoj atingis 33 kvadratajn metrojn, kaj pro la altiĝo de la nivelo de medicina servo la averaĝa vivdaŭro de lokanoj altiĝis de malpli ol 36 jaroj antaŭe ĝis 67 jaroj nun. Tibetanoj kaj aliaj naciminoritatoj okupas ĉirkaŭ 78%



de la oficistaro de diversnivelaĵoj organoj de Tibeto.

Celebre al la 50-jariĝo de tibeta demokratia reformado, en la lasta februaro inaŭguriĝis en Pekino grandskala ekspozicio pri 50-jariĝo de tibeta demokratia reformado. Per fotoj, objektoj, dokumentoj la ekspozicio eksponas la atingojn de Tibeto en la lastaj 50 jaroj post la demokratia reformado. Ĝi utilas por plibone koni veran, disvolviĝantan kaj ŝanĝiĝantan Tibeton.

Por eksterlandanoj la ekspozicio povas klarigi la fakton kaj redoni al Dalai lian veran vizaĝon kaj montri la veran historion. Multaj okcidentanoj tion ne scias. Dank' al la ekspozicio tiuj en la mondo, kiuj zorgas Tibeton, povas koni la veran staton.

Ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, ŝtata prezidanto kaj prezidanto de la Militaferaj Komisionoj de Ĉinio Hu Jintao kaj aliaj ĉinaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj vizitis la ekspozicion. Dum la vizito Hu Jintao diris, ke la demokratia reformado en Tibeto estas la plej vasta,

profunda kaj signifohava socia ŝanĝiĝo kaj ankaŭ grava kontribuo, farita de la ĉina popolo por disvolviĝo de la monda homrajta afero; la grandega socia ŝanĝiĝo de Tibeto en la pasintaj 50 jaroj konvinke atestas, ke nur sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio Tibeto povas realigi la transpaŝan disvolviĝon de la ekonomio kaj socio kaj tibetaj diversnaciecaj loĝantoj povas fariĝi mastroj de la ŝtato, krei kaj ĝui feliĉan kaj pacan vivon kune kun diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando.

En la jaro 1951 la ĉina centra popola registaro subskribis interkonsenton pri paca liberigo de Tibeto kun la tibeta loka registaro. Laŭ la reala stato de Tibeto, oni ne tuj praktikis reformadon de la socia politika sistemo en Tibeto. Tamen, en marto 1959, subtenate de eksterlandaj fortoj, la tibeta reakcia





regantaro estrata de Dalai senskrupule lanĉis ĉiuf flankan armitan ribelon, kun la intenco reteni la servutan teokratian sistemon. Dum la ribelo, diverslandaj ĵurnalistoj ne sciis, kie estas Dalai kaj kion li faras. Nur la usonaj sciis, ke Dalai perfidante la patrolandon fuĝas al Hindio.

La centra registaro devigite subigis la ribelon, komplete likvidis la feŭdan servutulan sistemon kaj komencis demokratian reformadon en Tibeto kaj miliono da servutuloj liberiĝis. En la lastaj 50 jaroj de post la tibeta demokratia reformado, la tibetaj diversnaciecanoj, kiel mastroj de la regiono, zorgate de la centra registaro kaj helpate de la tutlanda popolo, elverŝis grandegan entuziasmon por konstrui novan socion kaj krei novan vivon kaj kreis miraklojn unu post alia en la moderniga konstruado.

Vizitante la grandskalan ekspozicion, Erdeni Qoigy Gyibo Panchen la 11-a esprimis, ke la liberiĝo de tibetaj servutuloj tute konformas al la celo de tibeta budaismo. Li diris, ke la ekspozicio spegulas la obskuron de la tibeta servutula sistemo kaj mizeran vivmedion de tibetanoj kaj plene montras la grandegan ŝanĝiĝon de Tibeto en la pasintaj 50 jaroj, miliono da liberigitaj servutuloj akiris la

rajtojn de persona libereco, ekzisto kaj eoluado, la laborantaj popolanoj fariĝis mastroj de Tibeto. Faktoj estas pli elokventaj, nur la Komunista Partio de Ĉinio povas doni dignon kaj liberecon al miliono da servutuloj.

Komitatano de Tutlanda Komitato de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj viva budho Tsonlo Champa Kedup de la monaĥejo Qambaling esprimis, ke de la antikveco Tibeto estas nedisigebla parto de Ĉinio. Li diris, ke la tibeta popolo feliĉe vivas kaj tibetaj monaĥoj kaj ordinaraj homoj ĝuas senprecedencan liberecon por kredi je religio kaj tio estas nedisputebla fakto.

Tibeto estas parto de Ĉinio kaj tio estas historia fakto. Antaŭ 700 jaroj, en la 13-a jarcento, la centra registaro de la dinastio Yuan de Ĉinio ekpraktikis efikan administradon super Tibeto. De tiam ĝis la jaro 1949, kiam la nova Ĉinio fondiĝis, tia situacio neniam ŝanĝiĝis. Sukcesos nenies intenco spliti Tibeton disde Ĉinio. La unika vojo por Dalai estas forlasi 'tibetan sendependigon' kaj ĉesigi iun ajn splitan agaĉon.

Bedaŭrinde, malgraŭ la historia fakto en la Okcidento ĉiam ekzistas negativa raportado pri Ĉinio, precipe pri Tibeto. La malverajn informojn,

fabrikatajn de iaj amaskomunikiloj, ĉiam laŭdaĉas malmultaj politikistoj. Marte de la kuranta jaro por nudigi ies politikan distordon kaj forigi miskomprenon, delegacio de ĉinaj tibetologoj faris viziton al iuj landoj kaj kondukis profundajn interfluron kaj studadon kun koncernaj personoj de la rondoj politika, akademia kaj gazetara kaj konigis al ili pri la vera stato de Tibeto. Post kiam la delegacio konigis la veran Tibeton en Italio, sinjoro Giorgio Mentici, profesoro de Napoli Universitato, konigis sian esplorfrukton pri la historio kaj la nuna stato de Tibeto kaj malkaŝis duvizaĝecon de Dalai, kiu antaŭ la internacia opinio distrumpetas 'altan aŭtonomecon', fakte intencas spliti Tibeton disde Ĉinio. La profesoro montris, ke Tibeto de antikkece estas nedisigebla parto de la ĉina teritorio. Alia profesoro pri filozofio kaj historio de Urbinoc Universitato Domenico Losurdo montris, ke iuj priskribis Tibeton regitan de Dalai kiel paradizon, sed ĉiuj, kiuj iomete konas historion, senescepte scias, ke en tiama Tibeto estis regado kruela kaj nehoma.

Karaj legantoj, ni ĝojas, ke dank' al aŭskultado de nia elsendo, multaj el vi havas sufiĉe da kono pri Tibeto, kvankam ankoraŭ ne tiel profunde. Se estos oportune, vojaĝu al Ĉinio kaj propraokule vidu la veran Tibeton. Tibeto varme bonvenigas vin kaj diverslandajn turistojn! ★





## Aktivado memore al unujariĝo de tertremo en Wenchuan



La 12-an de majo pasintjare, en Wenchuan de la provinco Sichuan, Ĉinio, okazis fortega tertremo, kiu kaŭzis morton de sume 69 mil personoj kaj perdiĝon de 17 mil homoj kaj la rekta kapitala perdo superis 840 miliardojn da juanoj de renminbi. Unu jaron poste en la urbeto Yingxiu de la gubernio Wenchuan, centro de la tertremo, okazis solena memoriga aktivado. Ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao kaj aliaj gvidantoj kaj reprezentantoj de diversaj rondoj partoprenis en la aktivado.

Prezidanto Hu Jintao faris gravan paroladon. Li diris, ke la unuanima penado de ĉinoj, komuna helpado de la transmaraj samlandanoj kaj aktiva subtenado de la internaciaj amikoj gajnis al ni en la savado kaj rekonstruado gravan sukceson. Poste prezidanto Hu Jintao kaj aliaj laŭvice iris antaŭ la memorŝtonon de la tertremo kaj omaĝis krizantemon al viktimoj.

Je la 14-a horo kaj 28 minutoj, ĉiuj ĉeestantoj silente funebris al mortintaj

popolanoj kaj martiroj en la tertremo.

Helpate de frataj provincoj, rapide progresis la rekonstruado. Laŭ statistiko, ĝis la fino de aprilo de la kuranta jaro, postkatastrofa rekonstruado en la tri provincoj Sichuan, Gansu kaj Shaanxi jam finis investon je 360 miliardoj da juanoj.

Nun en la kampara katastrofejo, 75% de la lernejoj estas konstruataj, plifortikigo kaj riparo de domoj jam estis tute finitaj, pli ol 98% de novaj domoj estis ekkonstruitaj, kaj en urboj kaj urbetoj, pli ol 40% de novaj domoj jam finkonstruiĝis. Samtempe, higienaj institucioj, fervojoj, ŝoseoj, flughavenoj kaj aliaj bazaj instalaĵoj, estas rekonstruataj.

Nun ĉiuj rekonstruaj laboroj streĉe iras kaj la popolanoj de la plagitaj regionoj vivas feliĉe kaj trankvile. La granda progreso de la rekonstruado montris al la mondo forton kaj bravecon de la granda ĉina nacio. ★



# Ĉinio ludis gravan rolon en la 2-a Financa Pinta Konferenco de ŝtatestroj de Grupo 20



En la 2-a de aprilo okazis en Londono la 2-a Financa Pinta Konferenco de Ŝtatestroj de Grupo 20. Ŝtatestroj de memrolandoj de Grupo 20 kaj gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj, Internacia Mona Fonduso, Monda Banko, Financstabila Forumo kaj aliaj internaciaj organizoj, partoprenis en la Konferenco.

Ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao ĉeestis al la Konferenco kaj intervidiĝis respektive kun usona prezidento Barack Obama, brita ĉefministro Gordon Brown, rusa prezidento Dmitry Medvedev, franca prezidento Nicolas Sarkozy, japana ĉefministro Taro Aso, aŭstralia ĉefministro Kevin Rudd, brazila prezidento Luiz Inacio da Silva kaj aliaj, kaj interŝanĝis opiniojn pri du-flankaj rilatoj kaj kune atentataj problemoj. Ili atingis komunajn konojn pri traktado de la financa krizo kaj aliaj problemoj.

En la konferenco Hu Jintao faris gravan parolon titolitan "Kune kunlaboru kaj klopodu por venki malfacilan tempon". Li diris, ke la nuna plej urĝa tasko estas, ke oni plenforte rekomencu



kreskadon de monda ekonomio kaj preventu seriozan konsumiĝon, oponu kontraŭ protektismo en iu ajn maniero, protektu malferman kaj liberan komercan investan medion, rapidigu koncernajn reformadojn kaj rekonstruu internacian financan ordon. La parolado de Hu Jintao vekis vastan atenton kaj gajnis pozitivan takson.

Antaŭ veturo de Pekino al Britio, intervjuate de Xinhua Novajagentejo,


Hu Jintao diris, ke fronte al la nuna komplika kaj ŝanĝiĝema internacia ekonomia situacio, nia plej urĝa tasko estas: Unue, kiel eble plej rapide stabiligi la internacian financan merkaton, efektive elvolvi la akcelan rolon de financo al la reala ekonomio, kaj levi la fidon de popolamasoj kaj entreprenoj; due, alpreni ekonomi-stimulajn rimedojn konformajn al la propra ŝtata cirkonstanco, plifortigi akordiĝon de makroskopaj ekonomiaj politikoj de diversaj landoj, kaj kune realigi la garantion al evoluado, enokupigo kaj popola vivo; trie, strebi por deteni protektismon de komerco kaj investo, kaj redukti damaĝon de la krizo al diversaj landoj, precipe al la evoluantaj landoj; kvare, laŭ la principo de amplekseco, ekvilibreco, progresiveco kaj efikeco, impulsi necesan reformadon al la internacia financa sistemo, por eviti reaparon de simila krizo. Li esprimis: "Ĉinio daŭre persistos en la ekstera malfermo kaj en la strategio pri reciproka utilo kaj komuna gajno."

La konferenco gajnis pozitivajn fruktojn kaj atingis la celon por stabiligi financan sistemon. Por kune trakti la financan krizon la gvidantoj de G20 atingis plurajn komunajn konojn, ekzemple pri mon-plimultigo al Internacia Mona Fonduso kaj aliaj financaj institucioj kaj plifortigo de superigardo al financo. ★





## Bone zorgu vin vizaĝe al la mondskala gripo A H1N1



Fine de la lasta aprilo okazis en Meksikio gripo A H1N1, kiu poste plivastiĝas tra la tuta mondo. Laŭ

statistiko de la Monda Organizo pri Sano, ĝis la 14-a de junio, en 75 landoj kaj regionoj troviĝas konfirmitaj infektitoj.

Okaze de la ekspansio de la epidemio, Ĉinio tenas altan singardemon. Ĉina ĉefministro Wen Jiabao kunvokis apartan kunvenon kaj dispoziciis fortigan laboron pri preventado de la gripo. Ĉina Ministerio pri Sano aranĝis apartan kapitalon je 5 miliardoj da juanoj de renminbi por fari preventadan kaj superregan laboron. La 11-an de majo, en Ĉinion venis kazoj.



Pri tio ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao faris gravan instrukcion, postulante, ke koncernaj fakoj plenforte malhelpu disvastiĝon de la epidemio en Ĉinio kaj garantiu sanon kaj vivon de la popolamaso. ★

## Averta nivelo de gripo A H1N1 altiĝas al 6-a grado

Vespere de la 11-a de junio en Ĝenevo, Margaret Chan, ĝenerala direktoro de Monda Organizo pri Sano, proklamis en gazetara konferenco, ke ŝi decidis altigi avertan nivelon de gripo A H1N1 al la 6-a grado, nome la plej alta grado. Tio signifas, ke la unua gripo en la 21-a jarcento estas en granda cirkulado en la tuta mondo.

Monda Organizo pri Sano ankaŭ akcentis specialecon de gripo A H1N1 por ke la publiko ne estu kaptita de paniko. Margaret Chan diris, ke "granda cirkulado de gripo" reflektas ĉefe ekspansian sferon de virusoj sed ne seriozecon de la gripo mem.

Sed Monda Organizo pri Sano konfesis siajn maltrankvilojn pri la nuntempa gripo. Unue, virusoj de la gripo rapide ekspansias kaj atakas apartajn homamasojn. Pluraj gripoj en la pasinta jarcento bezonis 6 ĝis 9 monatojn por ekspansii en la tuta mondo sed gripo A H1N1 bezonis nur malpli ol 2 monatojn. Virusoj de la

gripo atakas ĉefe junulojn kun la aĝo de malpli ol 25 jaroj. Ankaŭ homoj kun kronikaj malsanoj kaj gravedulinoj estas facile atakitaj de la gripo.

Due, ekzistas granda ebleco de variigo de virusoj de la gripo. Monda Organizo pri Sano plurfoje substrekis, ke kvankam nuntempe la homaro posedas iujn karakterizojn de gripo A H1N1, tamen ankoraŭ estas multaj demandoj pri la gripo. Nuntempe la gripo ankoraŭ estas en la fundamenta periodo, ĝiaj virusoj ĉiam eble variigos en malfacile prognozeblaj manieroj kaj eble naskos variojn kun altaj mortigaj proporcioj.

Trie, la publiko eble malstreĉos

singardemon pro mildeco de la gripo. Margaret Chan diris, ke estas bona novaĵo, ke iuj infektitoj kun malserioza simptomo mem resaniĝas, sed estas maltrankvilige, ke la publiko eble malstreĉos sian viglatentemon.

Fine, mankas al evoluantaj landoj kapablo trakti kontraŭ la gripo. Nuntempe la gripo aperas ĉefe en relative riĉaj landoj, sed neimagebla estas rezulto, se la gripo cirkulos en plej malriĉaj landoj. ★



# Ĉinio publikigis Ŝtatan Agadplanon pri Homaj Rajtoj

《国家人权行动计划（2009—2010年）》发布



reformado kaj malfermo, Ĉinio prenas la respekton kaj protekton de homaj rajtoj kiel la gravan principon. Ĉinio enskribis tiun ĉi principon en la konstitucion.

La plano konsistas el enkonduko, sekureco de rajtoj je ekonomio, socio kaj kulturo, sekureco

efikajn rimedojn por efektive protekti rajtojn de ĉiuj membroj. Ĉinio plifortigos la konstruon de demokratio kaj jurregado, perfektigos la demokratian sistemon, riĉigos demokratiajn formojn, larĝigos la demokratian kanalon, akcentos sekurecon de homaj rajtoj en la administracia kaj justica leĝplenumado kaj pliigos la sekurecon de civitanaj kaj politikaj rajtoj. ★

En la lasta aprilo Ĉinio publikigis Ŝtatan Agadplanon pri Homaj Rajtoj 2009—2010. Tio estas la unua ŝtata plano de Ĉinio pri homaj rajtoj. La plano difinas la celon kaj konkretajn laborrimedojn de la registaro pri akcelo kaj protekto de homaj rajtoj.

De post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, precipe de post la

de civitanaj rajtoj kaj politikaj rajtoj, sekureco de rajtoj de naciminoritatoj, virinoj, infanoj, maljunuloj kaj handikapuloj, edukado pri homaj rajtoj kaj plenumado de internacia devo pri homaj rajtoj kaj koncernaj internaciaj interŝanĝoj kaj kunlaboroj.

La plano diras, ke en la jaroj 2009 kaj 2010 Ĉinio prenos pozitivajn kaj



## Forta tertremo okazis en Italio



La 6-an de aprilo okazis forta tertremo en la urbo L'Aquila kaj la regiono Abruco proksime al Romo. La granda tertremo kaŭzis, ĝis la 8-a de

aprilo, morton de preskaŭ 300 personoj kaj vundiĝon de miloj da homoj.

Multaj esperantistoj kaj E-organizoj kun doloraj sentoj sendis mesaĝon al

Renato Corsetti por esprimi kondolencon kaj konsolon. Ni estas tre ĝojaj, ke junaj italaj esperantistoj de la tertrema regiono faras ĉion eblan por helpi la senhejmulojn. Membroj de la E-Redakcio de ĈRI petis d-ron Renato Corsetti, Mario Amadei kaj aliajn italajn aŭskultantojn transdoni niajn profundan kondolencon al la viktimoj kaj konsolon al la plagitoj. Ni esperas, ke rapide stariĝu normala vivo de la plagitoj. ★







1

**F**iniĝis la Foto-Konkurso kaj venis sume dekoj da verkoj el Italio, Hungario, Pollando, Rumanio, Rusio kaj aliaj landoj. Ni ege bedaŭras, ke iuj foto-amatoroj ne partoprenis en la Konkurso. Post juĝado 4 partoprenintoj gajnis premiojn. Ili estas Giovanni Lancellotti el Italio, Tereza Turányi el Hungario, Lenke Szasz el Rumanio kaj Henryk Zygowski el Pollando. Bonvole aprecu kelkajn.



2



3



4

## Foto-Konkurso 2008



5

1. La mezepoka palaco de la urba registaro de Siena apud Florenco  
*Giovanni Lancellotti el Italio*
2. Mia neforgesebla vojaĝo tra germana biciklovojo  
*Henryk Zygowski el Pollando*
3. Ekskursantoj-esperantistoj sur la monto "Stubnerkogel" en Aŭstrio  
*Tereza Turanyi el Hungario*
4. Rumaninoj en naciaj kostumoj pretigas tradician manĝaĵon  
*Lenke Szarz el Rumanio*
5. La 10 genepoj en mia granda harmonia familio  
*Sebastiao Rosa Machado el Brazilo*

## Informilo de Ĝemelaj Urboj aperis en nova formo

Informilo de Ĝemelaj Urboj estas reta bulteno de UEA pri la projekto Ĝemelaj Urboj, per kiu ni celas konstrui ponton inter urboj, precipe inter ĝemelaj urboj. Mi starigos rubrikon "Urbestro kaj Esperanto" en la Informilo. Estas kolektataj

partopreno kaj parolado de urbestroj en ajna Esperanto-aranĝoj inkluzive de fotoj. Via partopreno estas mia atendo kaj prosperigi Esperanto-aferton estas komuna ideo kaj via kaj mia.

*Redaktoro de la Informilo Wu Guojiang*

### Informilo de Ĝemelaj Urboj

Reta bulteno de UEA pri la projekto Ĝemelaj Urboj  
8-a jaro N-ro 1 (28) Marto 2009



Propozoj al esperantistoj en ĝemelurboj por agado de la persona adopta lingvo  
La delegacio de ĝemela urbo partoprenas en GEK kaj EEK  
Historio, Esperanto-movado kaj ĝemelurboj de Changchun  
Taglibro de vojaĝo en Tianjin  
Eldoniĝis la libro « Kvindek da tagoj en Esperantaĵo »  
Pri foto sur la kovrilo



# Anteo: Esperanto estas mia spirita partnero

Anteo, kies ĉina nomo estas Mao Zifu, naskiĝis en la jaro 1963 kaj esperantistiĝis en 1986. Malfeliĉe trafite de trafika akcidento en 1985, li sin dediĉas al Esperanto kaj altiras al si multe da atento kaj laŭdo eĉ de la nuna prezidanto de UEA s-ro Probal Dasgupta pro siaj elstaraj atingoj en E-versado. Antaŭ nelonge, nia gazeto "Mikrofone" faris intervjuon al li.



**Mikrofone:** Kio estis via profesio antaŭ paraliziĝo pro la trafika akcidento?

Anteo: Antaŭe mi estis vigla sportisto kaj instruisto pri matematiko en Changde-a Informprojekta Teknika Lernejo. Poste pro la trafika akcidento en la jaro 1985, kiam mi estis nur 22-jaraĝa, mi paraliziĝis kaj nature perdis instruistecon. Nur de tempo al tempo mi instruas lernejanon en mia hejmo. Ĉio por mi estas nur sonĝo.

**Mikrofone:** Viaj familianoj donis al vi grandan helpon post la akcidento?

Anteo: Certe! Unue estis miaj gepatroj. Bedaŭrinde antaŭ 2 jaroj mia patrino forpasis. Tuj post ŝia forpaso, mi verkis poemon kaj kontribuis ĝin al franca gazeto "La Kancerkliniko". Nuntempe mi loĝas kune kun miaj plijuna fratino kaj

nevino. Sen ili mi ne povus vivi ĝis nun.

**Mikrofone:** Kiam vi komencis lerni Esperanton?

Anteo: Mi eklernis Esperanton en la jaro 1986, unu jaron post la trafika akcidento. Precize dirite, mi tiutempe memlernis kaj ne havis instruistojn. Mi legis unue lernolibrojn kaj sekve

## Hodiaŭ

*Anteo*

apenaŭ mi ellernas kuri,  
unu piedo jam staras tombon.

edzino iris al marso,  
kune kun niaj idoj.

mioj restas en kvar ĉambroj,  
ankoraŭ vako.

inton kaj onton sur pesilo  
mi ne povas klare legi;  
obskuraj kandeloj nebuligas  
la nombron.  
for matematikon!

versoj naĝas en cerbumo.  
fabriku fifabriku spite.  
ilin sendu al  
mi mem la dua.

neatingebla la poŝtofiĉejo.

gazetojn kiel "El Popola Ĉinio". Post 4 jaroj, mi fundamente scipovis la lingvon. Fakte mi lernis kaj lernas Esperanton nur por tempo-pasigo, distriĝo kaj amuzo. Esperanto estas mia spirita partnero. Menciindas, ke en la jaro 1997 mi posedis komputilon kaj ekde tiam mi uzas ĉefe la maŝinon anstataŭ skribado.

**Mikrofone:** Estas bone konate, ke vi estas elita Esperantisto-poeto. Kiam vi ekverkis poemojn?

Anteo: Post fundamenta scipovo de la lingvo, mi ekverkis kaj

kontribuis poemojn, recenzojn kaj novelojn al gazetoj. Mi memoras, ke mia unua poemo enhavis nur 8 versojn kaj poste aperis en la gazeto "La Mondo". Vi scias, ke la unua ofte estas la plej grava. Mi versis la poemon post kiam mi kaj mia patrino vizitis parkon. Mi poste kontribuis artikolojn al "Penseo", "El Popola Ĉinio", "Monato", "La Gazeto", "La Kancerkliniko", "Fonto" kaj tiel plu. Lastjare mi kontribuis ĉefe al "La Gazeto", "La Kancerkliniko" kaj "Beletra Almanako". Dank' al eksterlandaj redaktoroj, kiuj ofte sendas al mi librojn por recenzi, mi verkas multe da recenzoj.

**Mikrofone:** Kiujn premiojn vi jam akiris?

Anteo: En la jaro 1995 mi gajnis la premion de UEA "Nova Talento de Belartaj Konkursoj", en 1997 premion "Grabowski" kaj en 1999 premion donitan de Ĉina E-Ligo pro literatura merito.

**Mikrofone:** Kion Esperanto alportis kaj alportas al vi?

Anteo: Multe! Per Esperanto mi konatiĝis kun multaj amikoj en eksterlandaj. Ili sin trovas en almenaŭ 10 landoj kiel Francio, Usono, Hispanio kaj Japanio. Ni ofte interleteras kaj malofte interrete parolas pro tempo-diferenco inter ni. Miaj francaj amikoj gesinjoroj Septier unuafoje vizitis min en la jaro 1995 kaj ekde la jaro 2005 ili du ĉiujare vizitas min. Ĉiufoje ili restas en mia urbo Changde almenaŭ unusemajne. Veninte el Francio, ili ofte manĝas kune kun mi en mia ĉambro. Ili kelkfoje portis manĝaĵojn el hotelo al mia ĉambro kaj lastjare portis manĝaĵojn rekte el Francio. Tio estas la unua fojo por mi gustumi eŭropajn manĝaĵojn. La edzino tre ŝatas Ĉinion kaj lernas



la ĉinan lingvon en universitato. Menciindaj estas ankaŭ s-ro Xie Yuming (laboranto en E-redakcio de Ĉina Radio Internacia), s-ro Wang Chongfang (veterana esperantisto en Ĉinio), s-ro Shi Chengtai (veterana esperantisto en Ĉinio) kaj s-ro Hu Guozhu (veterana esperantisto en Ĉinio). Ili ĉiuj estas miaj instruistoj kaj mi respektas ilin kiel la plej bonajn esperantistojn eĉ en la tuta mondo. Mi konis Xie Yuming antaŭ 10 jaroj kaj sendis al li ekzempleron de mia poemaro por akiri de li recenzon. Mia alia amiko s-ro Jiang Zuyue (veterana esperantisto en Ĉinio), kiu bedaŭrinde forpasis antaŭ unu jaro, helpis min kaj en Esperanto-lernado kaj en mia vivo. Antaŭe li sendis al mi multe da sonbendoj pri Esperanto. Mi ekaŭskultis sonbendojn ĝuste post konatiĝo kun li. Miaopinie li estas tre talenta esperantisto.

**Mikrofone: En via ĉambro estas multaj libroj. Vi certe estas legema.**

Anteo: Fakte ĉi tie estas nur duono de miaj libroj. Mi kaŝis la ceteron en alia granda ĉambro. Mi tre ŝatas legi novelojn, poemojn kaj recenzojn. Efektive fininte bazan lernadon, mi eklegis librojn poeziajn ekzemple “Esperanta Metriko” de s-ro Hu Guozhu kaj “Esperanta Antologio (Poemoj 1887-1984)” de s-ro William Auld. Mi tre ŝatas la romanon “Ruĝdoma Songô”. Demandite de redaktoro de franca gazeto pri tio, se mi unusola loĝus en izolita insulo, kiun libron mi ŝatus kunporti, mi respondis: la tri volumojn de “Ruĝdoma Songô”. Dum somero, mi ĉiutage legas librojn. Matene mi sidas sur rulseĝo kaj posttagmeze kuŝas en la lito.

**Mikrofone: Ĉu vi zorgas pri disvolviĝo de Esperanto?**

Anteo: Certe jes. Kvankam ĉirkaŭ mi ne troviĝas homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, tamen mi zorgas pri E-movado en Ĉinio kaj eĉ

en la tuta mondo. Laŭ mia opinio, multaj E-asocioj en Ĉinio verŝajne ne efektive aktivis sed nur sloganas. Mi esperas, ke ni esperantistoj unue ellernos bone la lingvon Esperanto; sekve kontaktiĝos kun neesperantistoj.

**Mikrofone: Viaopinie ĉu Esperanto havas estontecon?**

Anteo: Mi tre kredas. Laŭ mi, nuntempe la angla lingvo estas verŝajne internacia, sed ĝi eble perdos

### Aspiro

*Anteo*

neniam revas  
frida somat' per via korpovarmo  
sin degeligas el rigido,  
kvankam kuŝas vi en mia koro.  
flagro de alumeto  
estas sufiĉa ja senti  
al etiola okulparo sunon.

neniam sonĝas  
marto antaŭtempe morta  
per viaj lipoj  
trovi fekundan aŭtunon.  
guto da roso  
povas vigligi velkan koron.

ol morte obteni de vi larmon  
mi preferas vive ĝui suferadon,  
kondiĉe ke vi lasu min sableri  
sur viaj pupiloj.

la palpebrumo igos min  
solide stari dekmil jarojn.

sian potencon kaj ĉefan lokon kun la tempo. Miaj amikoj lernis la anglan lingvon multe da jaroj, sed ili tute ne kapablas verki en la angla lingvo. Efektive Esperanto estas ankaŭ malfacila por ni ĉinoj. Sed kompare kun la angla lingvo, Esperanto estas tre facila. Vidu, lerninte la anglan lingvon pli ol 10 jarojn, mi povas nur legi.

**Mikrofone: Vi mem estas talenta esperantisto-poeto. Ĉu vi havas bonajn proponojn kaj konsilojn por tiuj, kiuj volas lerni Esperanton?**

Anteo: Unue detale tralegu lernolibrojn, sekve vaste legu materialojn en la interreto kaj trie tralegu vortaron, se vi havus tempon. Mi mem tralegis vortaron trifoje. Tralegi vortaron helpas min mastri ne nur vortojn sed ankaŭ frazojn.

**Mikrofone: Ĉu vi opinias, ke Esperanto estas utila por nuntempaj gejunuloj?**

Anteo: Almenaŭ mi havas tian opinion. Nuntempe por junuloj necesas komunikado. Iuj junuloj uzas nur Skajpo, QQ kaj tiel plu, kaj ilia tempo bedaŭrinde perdiĝas en ludado. Se ili lernus Esperanton, ili havus bonan metodon pasigi tempon.



**Mikrofone: Ĉu vi de tempo al tempo aŭskultas E-elsendon de Ĉina Radio Internacia?**

Anteo: Mi komencis aŭskulti vian elsendon antaŭ 10 jaroj kaj nuntempe mi aŭskultas ĉefe en la interreto.

**Mikrofone: Ĉu vi havas proponojn pri E-elsendo?**

Anteo: Mi opinias, ke via radio devas esti pli vigla pri ĉiuj temoj. Mi esperas, ke via radio fariĝos televido kaj elsendos pli multe da intervjuoj pri esperantistoj aŭ pri neesperantistoj, kaj oni povos elŭti ilin amase, se via radio metus ilin kune. Intervjuoj interesas certe ne nur min kaj miajn amikojn, sed ankaŭ multajn samideanojn en diversaj landoj. Mi scias, ke multaj amikoj tre ŝatas intervjuojn. Aŭskultinte tiajn intervjuojn, oni povas senti, ke la lingvo Esperanto estas vere viva, vigla kaj lernebla. ★

# Cititaj Leteroj

海外飞鸿

## Leopold Patek el Aŭstrio:

Ĉinio altigis la buĝeton de la armeo je 15 %. Ĉu ne estas pli bone preni la monon por la sekureco de la laborkondiĉoj de ministroj? Tro ofte okazas akcidentoj en ĉinaj minoj!

*Jes, ĉi-jare Ĉinio elspezos por nacidefendo pli ol 472 miliardojn da juanoj de renminbi, plimulte je 15% pli ol en 2008. La elspezo estos uzata ĉefe por plibonigi la vivon de la oficiroj kaj soldatoj de la armeo, fortigi ĝian informan konstruadon, racie pliigi ekipaĵojn kaj kompletigajn instalaĵojn, altigi la armean kapablon kontraŭ danĝero kaj katastrofo, subteni rekonstruadon de bazaj instalaĵoj de la trupoj en tertreme plagita regiono Wenchuan. Koran dankon al Patek kaj aliaj, kiuj ĉiam zorgas pri Ĉinio.*

## Jiri Patera el Ĉeĥio:

Lastatempe mi ne aŭdis kelkajn viajn elsendojn, ĉar mi estis denove en hospitalo. Oni operaciis mian ingvenan hernion. Hejmreveninte en la fino de la lasta marto, mia unua intereso estis provi kapti vian elsendon.

La 28-an de marto en nia lando estas festata kiel la Tago de Instruistoj, por la naskiĝtago de nia grava pedagogo de la 17-a jarcento Jan Amos Komensky (Komenio). En liaj verkoj li antaŭvidis ekziston de artefarita internacia lingvo, sed mi konstatis, ke en Ĉinio la 28-a de marto estas la Memortago de liberigo de miliono da servutuloj en Tibeto antaŭ 50 jaroj. Tial en via elsendo enhavis serion da artikoloj pri Tibeto. Mi estis surprizita, ke inter la artikoloj aperis eĉ mia simpla letero. La enmeto de mia letero en vian elsendon ĝojigis min kaj nepre influis pozitive al mia postoperacia sanstato.

## Anton Kronshage el Germanio:

Al ĉiuj de la diligenta teamo dankon kaj bonfarton! Jen foto farita de mia edzino Agnes, kiu temas pri la momento, kiam mi legas vian dankleteron tuj post elpakado de via donaco kun Mikrofone.



## J. v. d. Hoeven el Nederlando:

*Antaŭ ne longe, ni ricevis leteron de s-ro J. v. d. Hoeven, en kiun li enmetis sian artikolon "Fruktoj Verdaj", aperigitan en la <Nederlanda Katoliko>. Nun ni citu kelkajn paragrafojn.*

Kiu fariĝis esperantisto, tiu plivastigas sian vidpunkton, ne nur mense, spirite, sed ankaŭ laŭlitere. Tio videblas kiam verduloj trarigardas sian kolekton de bildkartoĵoj, senditaj de samideanoj el multaj landoj de nia terglobo. Riĉfonto de mondaj belaĵoj!

Aparta atento tamen estu donata al la kartoĵoj, kiuj estas provizitaj per E-teksto aŭ temas pri E-aferoj. La plej kutima teksto estas la pli ol konata "Saluto el ...". En mia kolekto mi trovas: Olomouc, Sofio, Roza Valo en Bulgario, bela insulo Sylt, Prostejev kaj multaj aliaj. Diversaj kartoĵoj kun tia saluto estas eldonitaj okaze de E-Kongreso aŭ E-Renkontiĝo.

## Clayton Ricardo Simoes Pereira el Brazilo:

Koran dankon pro la diskoj, Mikrofone kaj ĉiuj aliaj sendaĵoj. En la 1-a de aŭgusto, 2008, mi kreis



orkutan komunumon omaĝe al vi kaj viaj aŭskultantoj de via Radio. Mi rimarkis, ke estis nenia komunumo rilate tiun estimandan kaj gravan amasinformilon, kiu tre helpas la disvastigadon de nia valora Esperanto antaŭ multe da jaroj. Mi invitas vin partopreni en la komunumo kaj helpi ĝin kreski. Ĝi ekzistas kaŭze de vi kaj ĉiuj diverslandaj aŭskultantoj. Vi povas trovi ĝin pere de la malsupra ligilo: <http://www.orkut.com.br/Community.spx?cmm=63779845>.



*Ni kore dankas s-ron Clayton Pereira kaj aliajn, kiuj ĉiam zorgas pri nia elsendo kaj seninterrompe donas al ni helpon kaj subtenon.*

### Siabelkrim Boughoud-la dua aŭskultanto el Maroko:

Kun grandega ĝojo mi skribas al vi post aŭskulto de viaj Esperanto-elsendoj, hazarde en la unua tago de oktobro, kiu estis ĉina nacia tago, bona tago kaj festo, mi povis kapti viajn elsendojn.



Kiel komencanto de Esperanto, mi neniam parolis ĝin, ĉar mi loĝas en kamparo, kie ne ekzistas reto. Tial se mi volas skribi al miaj amikoj aŭ legi novaĵojn pri Esperanto, mi devas vojaĝi al urbo, kie mi tajpas al vi. Sed nun la afero iomete ŝanĝiĝis, ĉar mi povas aŭskulti viajn elsendojn en Esperanto. La programero Ĉiutaga ĉina lingvo, kiu estas por mi tre utila, kiel bela estas via lingvo kaj belega estas via kulturo. Jen estas mia vilaĝo, kie mi loĝas kaj aŭskultas

viajn elsendojn.

### Bondeziroj de E-Rondo el Pollando



Sunplenajn tagojn kaj multe da feliĉo deziras al Mikrofone la E-Rondo, plej junaj “Verdaj Arbetoj” el Rybnik, Pollando.

*Ni kore dankas la geknabojn kaj deziras al ili progreson en ĉiu tago!*

### Esperanto en marŝo



Eksprezidanto de Hispana E-Asocio Augusto Casquero instruas Esperanton en la urbo Kanton, suda Ĉinio.

*Petro Ye*

### Gratulon al ĉeĥa amiko Josef Kriz al nova loĝdomo

Fine de majo, Josef Kriz el Ĉeĥio informis nin en sia mesaĝo: “Meze de junio mi finos transloĝigon al nova loĝdomo en la vilaĝo Strašov, orienta Ĉeĥio, kie mi travivis mian infanaĝon. La vilaĝo estas ĉirkaŭata de belegaj densaj arbaroj, kie kreskas fungoj, mirteloj kaj ceteraj arbarfruktoj. Mia edzino fariĝis



pensiulino ekde la 1-a de aprilo, 2009; mi finas laboron ĉirkaŭ en duono de venonta junio. La nova domo estos finkonstruita komence de junio por nia enloĝiĝo.”

*Ni kredas, ke post transloĝigo la vivo de Josef Kriz certe estos pli komforta. Varman ratulon!*

### Diversaj landoj serioze traktas gripon A H1N1

De la lasta majo, la gripo A H1N1 plivastiĝas en la tuta mondo. Diversaj landoj sinsekve alprenis efikajn rimedojn kontraŭ la gripo. La epidemio vekis ĉe ni maltrankvilon por niaj diverslandaj aŭskultantoj. Maje ni rete petis informojn de niaj aŭskultantoj, ĉu ili kaj iliaj parencoj estas sanaj. Sekve venis jenaj ĝojigaj informoj:

Clayton Pereira el Brazilo: “En Brazilo ĉio estas en ordo, malgraŭ la apero de malmultegaj kazoj, kiuj ankoraŭ ne estis konfirmitaj. Miaj geamikoj kaj gefamilianoj bonfartas kaj la registaro de mia lando bone zorgos pri la popolo. Mi deziras al la ĉina popolo multe da sano kaj baldaŭan resaniĝon al la infektitoj.”

Barkanyi Istvan el Hungario: “En Hungario ankoraŭ nuntempe oni ne trovis malsanulon. Nun la kompetentuloj pretigis la malsanulejojn por akcepti la estontajn malsanulojn.”

D-ro Renato Corsetti el Italio: “En Italujo estis du kazoj de homoj revenintaj el Meksiko, sed ambaŭ nun fartas bone. La instancoj pretigis kuracilojn por la malsano kaj ĉiuj malsanulejoj estas informitaj kiel pritrakti malsanon.”

Maritza Gutierrez el Kubo: “En Kubo neni kazo aperis. La kuba registaro informis vaste pri tio en la nacia televido, fakuloj parolis pri la malsano, avertis la civitanaron pri necesaj reguloj por eviti infektigojn. Kubo posedas ĉiujn rimedojn necesajn por trakti la gripon.” ★



世界各地

## Aliĝu al la 65-a IJK en Liberec', Ĉeĥio

La 65-a Internacia Junulara Kongreso okazos inter la 18-a kaj la 25-a de julio, 2009, en ĉeĥa urbo Liberec'. La kongresa temo: Libereco en ĉiuj formoj. Ĉi-fojan kongreson partoprenos ne nur ia landa teamo helpe de TEJO, sed brakon en brako la Ĉeĥa Germana kaj Pola E-Junularoj. Gejunuloj el la tri najbaraj landoj decidis kune realigi ian esperantistan revon.

Laŭinforme, Post longa kaj serioza diskutado, oni decidis, ke la 66-a Internacia Junulara Kongreso okazu en Los Cocos, Santa Cruz del Norte, Kubo, de la 24-a ĝis la 31-a de julio, 2010, tuj post la UK.

*El tejo tutmonde*

## Du gravaj Datrevenoj en 2009

Ĉi-jare estos la 150-jara naskiĝdatreveno de Lazaro Ludoviko Zamenhof (15.12) kaj la 100-jara naskiĝdatreveno de Ivo Lapenna (05.11). Memore al la du gravaj figuroj de la monda Esperantujo, Universala Esperanto-Asocio konsideras diversajn celebradojn dum 2009.

La Internacia Lingvo, Esperanto – kreita de Zamenhof – estas donaco al

la homaro, ne nur kiel komunikilo, sed ankaŭ kiel instrumento evoluigi-faciligi interpopolan komprenigon, por kiu Zamenhof uzis la esprimon Interna Ideo. Okaze de la 150-a jubileo, en la lasta decembro estis inaŭguritaj la solenaĵoj en la sidejo de Unesko en Parizo kadre de la solenaĵoj de la Internacia Jaro de Lingvoj sub la titolo "Esperanto, lingvo justa". Jam en 1959 okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof Unesko rekonis la eksterordinaran signifon de lia vivoverko proklamante lin unu el la grandaj personoj de la homaro.

D-ro Ivo Lapenna, konstruinto de niaepoka Esperanto-movado, estis longtempa gvidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj havas neforgeseblan meriton pro atingo de la internacia rekono de Esperanto ĉe la asembleo de Unesko en 1954, en Montevideo.

Ivo Lapenna naskiĝis en Split (Dalmatio, Jugoslavio) la 5-an de novembro de 1909 en malnova dalmata, aristokrata familio. Lia vivo estis plene kunligita al la Esperanto-ideo kaj movado. Li ellernis Esperanton kiel memlernanto en 1928.

Post lia forpaso la 15-an de decembro de 1987 en Kopenhago, honore al lia

agado estis starigitaj du institucioj: "Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna", kaj "Fondaĵo Ivo Lapenna" - kiuj nun instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, klubojn kaj individuojn ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

*El Ret-Inf.*

## Kune konstruu la oficialan Esperanto-urbon

Franca esperantisto kaj entreprenisto Michel Basso ja volas konstrui en junio 2009 en Herzberg am Harz du belajn grandajn monumentojn ESPERO kaj ESPERANTO. Li bezonas por la betonkrustoj de la monumentoj ŝtonetojn el la tuta mondo por esprimi la mondsolidarecon al la oficiala Esperanto-urbo Herzberg am Harz.

La unuaj ŝtonetoj jam eniris, ekz. vitra fragmento kaj ŝtonetoj de la fama Esperantoplatsen en Gotenburgo en Svedio. La urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg Gerhard Walter kaj Peter Zilvar (estro de la centro) jam nun tre ĝojas pri la mondvastaj kontribuoj.

*Germana Esperanto-Centro*



# Mikronovelo

## 微型小说



### Ĝibo

Unuatage direktoro Zhao jam rimarkis strangan fenomenon, ke escepte de la 2 vicdirektoroj, ĉiuj personoj iom klinas sin. Komence li pensis, ke tio estas ilia esprimo de amikeco kaj bonvenigo al li. Farante manpremon al ĉiu el ili, li diris, "Ne tiom ĝentilu! De hodiaŭ ni kune laboros kaj vi penetros mian karakteron."

Tamen poste li revidis, ke ĉies dorso havas la formon de la 3-a litero (C). Baldaŭ li informiĝis de la 2 vicdirektoroj, ke tio estas tradicio lasita de la antaŭaj estroj, tiel ke ĉiu el la membroj fariĝis tiel respektemaj, modestaj kaj singardaj. Direktoro Zhao ride skugetis la kapon.

Sekve direktoro Zhao mobilizis kampanjon pri dorsa rektigo. Li eĉ altigis politikan nivelon de la kampanjo, ke ĝi koncernas la kolektivitan figuron. Kaj, efektive, ĉiuj personoj perforte sin rektigis en kunvenejo. Direktoro Zhao, tre emociita kaj kortuŝita, faris longan parolon, favore al ili, tamen tio pli kaj pli frapis al li la okulojn, ke ŝvito perlas sur iliaj vangoj. Li indulgeme diris, "Malstreĉu vin! Mi scias, ke oni ne povas forigi kutimon en unu tago. Plej grave

estas, ke oni persistu en ĉiuj tagoj."

Antaŭ ol li finis la vortojn, ĝibo reaperis sur ĉies dorso. Eĉ aŭdiĝis softaj suspiroj, al ili faciligaj.

Poste li trovis, ke ĉies spino rektas laŭeble, kiam li enpaŝas iun ajn kabineton. Li faris sekretan observon kaj trovis, ke ili denove ĝibas sen lia ĉeesto. Tiom pli, ke kelkaj el ili, pro la kutimaĉo, pretis sin klini al li, tamen, ekkonsciinte la kampanjon, peno rektigis sin kaj eĉ provis elstarigi la bruston – tiam ŝajnis al li, ke li aŭdas sonetojn inter iliaj vertebroj. "Ho ve!" li pensis, "Mi sola ne povas gardi ilin!"

Li venigis oficejan ĉefgardiston kaj postulis, ke tiu elfaru tabelon kaj kombinu la dorsorektigan aktivadon kun premia sistemo. Tio ja tre efikis, tamen senprecedence turmentis la nejunajn kamaradojn. Ili do intencis forlasi la oficejon. Sed neniu el ili estis varbita aliloke.

Rilate al ekzamenado, ĝi falis sur la ŝultroj de la ĉefgardisto, kies familia nomo estis Qian. Sed ĝuste lia ĝibo estis la plej okulfrapa. En ĉiu monato li prezentis registron al direktoro Zhao kaj la direktoro zorge legis, kiomfoje tiu aŭ alia

rektigis la dorson en tiu monato. Fine direktoro Zhao ĝoje krietis, "Jam efike!"

Poste, en iu tago, direktoro Zhao revenis el grava konferenco. Tre gaja, li vizitis ĉiujn ĉambrojn inspekte. Baldaŭ nubo kovris al li la vizaĝon. Dirante nenion kritikan, li vidis panikon kaj embarason.

"Akvo troviĝas en via raporto!" li diris al Qian.

La ĉefgardisto ruĝiĝis. "Direktora Moŝto, malfacile!"

"Malfacile? Kia vi mem?"

Qian fulmorapide rektigis sin. Post momento, fakte nur en palpebruma daŭro, ŝvito pluvis kaj lia vizaĝo paliĝis.

La direktoro faris paŝon al li por lin subteni. "Kio al vi?"

"Mi... mi... pro troa... la spino..." li honteme provis stariĝi. "Pardonon! Mi... mi malbone plenumis la taskon. Mi... mi tute ne atendis, ke la kutimo, de tiom da jaroj, tiel obstinaĉas! Mi..."

Direktoro Zhao hastis en koridoron kaj kriis, "Aŭton! Rapide! En hospitalon!" ★

#### Horaro de Esperanta Disaŭdiĝo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renoviĝas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Zhan Xuede

Xiao Henggang